

PLENA ILUSTRITA VOLA PÜG'!

NOVA: MALKOVRU LA STEL-
FORMAN KURAC-GLUMARK-
ON POR ĈESI ESPERANTON



APROBITA
DE D-RO
KABE!

ŜOK-INTERVUO DE LA
KANTISTO DE LA VVĈP-oj,
LI DEKLARAS:
"ESTAS FALSE!
MI NENIAM
FIKIS KUN UNU
EL NIAJ AD-
MIRANTINOS!"



EKSKLUSIVE: LA BIOGRAFIO
DE ZAMENHOF BILDSTRIE:
LIA VIVO, LIA VERKO, LIA
PUGO ...



+DONACE:
UNU AFIŜO
DE ZAMENHOF
NUDA!!


WE
NEED YOU!

2,00 €



HO! ZAM...
SE MI SCIINTUS!

CI VIDAS, ETULIN'
... NE ESTAS TIOM
MALFACILA ESPERANTO!



AĈETU VOLA PÜG'!!!

REF!

SKANDALO: ZAMENHOF ESTIS NUDISTO!



Plena Ilustrita Volapüg - 2005

plena ilustrita VolaPüg'!

www.volapug.net
redaktoro@volapug.net

Directeur de publication:

Direktoro de la eldono:

Cyrille Poullet

Redaktoro - engaĝigo:

Platano & Tif

Korektoj:

Tif, Henri

Kontribuis al ĉi-numero:

Arnaŭ
Axel584
Ali Khadav
Chad, John, Antony
Bendi
Everland & Melono
François Hoetzli
Hodos
Nehundo
Phiip
Luiz Portella
Liko
Lee Seol kaj Nubo
R@f
Russ Williams
Serge Sire
Tif
Vanessa



Enhavo

Vorto de la redaktej'	p.3
Frontartikolo	p.3
Ajnejo	p.4-5
Esperanto-kurseto	p.5
Zamenhoru	p.6-10
Arnaŭ estas mensogemulo	p.11
D-ro Senesperanto	p.12-15
Freneza kokejo	p.16
Unu paĝo	p.17
la Majstro de la Ringoj	p.18-19
la danĝera lingvo	p.20
Kapitalisma venko	p.21
Kruda Vetero	p.22-25
Zam: liaj vivo, verko, pugo	p.26
Ne al la konsumada socio	p.27
Zorhof	p.28-29
Ammisil : La lojban sen peno	p.30-31
VVĈP-intervjuo	p.32
Rikiki	p.33
La malbela kuniklo	p.34-35
Recenzoj	p.36-37
Renkonto kun Fernando Gonsales	p.38
Kabe kurso	p.39
Vavaa-vivo	p.40



Lee Seol

Imprimé en décembre 2004, à 1500 exemplaires.

Toute reproduction autorisée sous réserve de l'indication de l'auteur et de la source, sur simple information à VolaPüg'.

Eldonita en decembro 2004, je 1500 ekzempleroj. Pri la artikoloj en ĉi-gazet' respondecas (aŭ maldecas) ties aŭtoroj, ne VolaPüg'!. Represaĵoj estas permesitaj, kondiĉe ke oni indiku la nomon de la aŭtoro kaj la fonton, kaj ke VolaPüg! estu informita.





Vorto de la redaktej'

La ideo



La vendado



La reagoj



Hódôs

Averto:


Humuri internacie estas ja malfacilega afero. Kial? Ĉar humuro tre ofte (se ne ĉiam) baziĝas sur kulturaj referencoj aŭ vidpunktoj. En la gazeto Vola Püg', kontribuas homoj el diversaj kulturoj: foje, kelkaj aferoj povas ridigi iujn kulturanojn, sed ŝoki aliajn kulturanojn. La celo de Vola Püg' estas doni al ĉiukulturaj desegnemuloj kaj humuremuloj la eblecon je esprimiĝi: ni mem, la ĉefredaktantoj, ne juĝas la kontribuojn nek elektas ilin laŭ personaj preferoj, sed male ni volus doni lokon por ĉiuj kulturoj (kaj se vi opinias, ke humuro de via kulturo ne estas reprezentata, ne hezitu buntigi la gazeton mem kontribuante!). Do, bonvolu ne ofendiĝi se iu aŭ alia kontribuajo ne plaĉas al vi, sed prefere komprenu, ke plejofte temas pri alikultura vidpunkto. Kaj kultura interŝanĝo *povas esti instrua kaj riĉiga afero, kvankam ne ĉiam facila...* Hodos

Frontartikolo

Platano

Mi scias kion vi pensas... kiel tiuj knabaĉoj ricevis tiom da monoj? Respondo : ni trovis sponsoron! Mi havas honoron anonci : « *Bovodko corporation* ». Bovodko © ne estas nur la fama drinkaĵo, kiu miksas bonan kreman lakton kun la plej forta rusa vodko. Bovodko estas ankoraŭ revo kaj idealo. Pro tio, je la nomo de la redaktej' mi levas mian Bovodkan© glason kaj dankas nian sponsoron! glup...glup ! Tiom forta sed tiom bona! ha ha ha!

Mi nun pli bone fartas „mu!“ ha ha ha ha ! Kio?... ha... jes frontartikolo. Volapug pugas kaj pugos ! glup... glup ! Pardonu se mi drinkas dume, sed mi bezonis energion ha ha... Por konkludi en unu frazo : Ero conulla facincilit vulpute modit iusto volore magna feumsan dreetue Bovodko!!!



BOVODKO

" Se estas bone por Bovo,
estas bone por homo ... "





Kial oni malsukcesas siajn ekzamenojn ? Lou



KARA FRATO, VI MULTĜE
FELIĜAS OL TAGOJ...

MI SCIAS, TANTO JAM
DIRIS LA SIMON AL MI...

Estas 365 tagoj en la jaro. Se oni malmetas la dimanĉojn (52!!) ĉar oni devas tiam viziti la geparencojn, restas 313 tagoj. Ankaŭ estas ne-laboraj tagoj, ktp.. Do, 40 malpli. Restas 273.

Dum la somero, estas 50 kiuj tro varmas, do, oni nepre devas iri eksteren. Restas 223 tagoj. Oni dormas 8 horojn nokte, do estas fakte, en unu jaro, 101 tagoj. Oni manĝas dum 2 horoj tage, do estas 30 tagoj. Restas 71 tagoj. Bezonatas iomete da tempo tage por iri al la kursoj, do estas 24 tagoj. Restas 47 tagoj.

Oni amoras pli ol du horojn semajne, estas (nur!) 5 tagoj. Restas 42 tagoj. La kutimaj hejmlaboroj prenas de ni 25 tagojn, restas 17 tagoj. Oni eksteren iras kun geamikoj 314 horojn, do malpli 13 tagoj. Restas 4 tagoj. Oni certe malvarmumas aux estas malsana almenaŭ 3 tagoj jare!

Do restas nur 1 tago por studi !! Sed tiam estas onia naskiĝdatreveno !! do... jen kial oni malsukcesas. Kaj kiam mi pensas ke kelkaj trovas tempon por iri al la kursoj !! Mi vere ne komprenas tion !!



fusado

dum "kluba tago" ĉe la universitato

DO, KIUN
KLUBON VI
REPREZENTAS?

MI ESTAS
ĈI TIE POR
LA ZORGOJ
DE VIRINOJ.
NI BATALAS
KONTRAŬ LA
OPRESADO DE
VIRINOJ EN NIA
MODERNA MONDO
DUM SUBTENI UNU
LA ALIAN EN NIA
TAGAJ VIVOS.

MI PENSAS,
KE VI BELETAS.

Nehundo

Esperanto-kurseto por la german-lingvanoj

En Esperanto,
la germana
vorto «Katze»
[kac] dirigas
«kato», kaj
neniel alie!





Karaj knabinoj, mi prezentas al vi mian amatan nevon Hans,
kies kaco estas la plej karesinda el la najbarejo!!


Liko






Zamenhoro












«Estas eta paŝo por homo...»





Arnaŭ estas mensogemulo Hodos



Ĉiuj fidelaj legantoj de La Kanceliniko (inter kiuj mi estas, kaj kion mi vigle konsilas ankaŭ al vi iĝi se ne jam farite) jam bone konas Arnaŭ-on. Ankaŭ la legantoj de la reta Vola Püg' probable iam trafis ie aŭ tie iun desegnaĵon de li. Jes, Arnaŭ estas esperantlingva kataluna komiksisto, eble unu el la plej famaj nuntempaj E-komiksistoj.

Antaŭ oko da jaroj, li regalis nin per 2 albumoj (unu ruĝa kaj unu blua), kie ni malkovris iun komiksiston tre

eman al sekso kaj ankaŭ al teksto, kvankam fervora varbanto de la «alternativa lingvo» (t.e. la lingvo de la korpo sen parolo). Du jarojn poste, li eldonis la albumeton «La D-ro Senesperanto serĉas la bonan etoson», kies stilo iomete ŝanĝis: temis ĉi-foje pri tuta aventuro (kaj ne nur kelkpaĝaj bildstrioj), malpli seks-hava ol kutime, sed tamen daŭre tiom tekstega. Kaj nun, post longa paŭzo (dum kiu Arnaŭ tamen ne pigris, desegnu-

mante ie kaj tie, kaj laborante ĉie tra la mond'), jen finfine aperas 2 novaj albumoj en lia kolekto «La sekso de la anĝeloj»!

La 3-a albumo de la kolekto, flav-kolora, anonciĝas per tre alloga titolo: «Malpli da teksto kaj pli da sekso». Sed fakte, ni malkovras en la albumo, ke ĝi ja tiom seksas, kiel kutime (aŭ pli, kompare al la albumeto «La D-ro Senesperanto serĉas la B.E.-on»)... sed bedaŭrinde ankaŭ tiom tekstas, kiel kutime. Nu, ne gravas, ni ŝatas lin tiel kaj ni alkitimiĝis je lia tekstemo.

Kaj la 4-a albumo, la nigra, titolitas «La vivo simplas», sed kiam oni tralegas ĝin, oni konstatas, ke la vivo ne tiom simplas por la D-ro Senesperanto (la ĉefheroo de la Arnaŭaj albumoj, iel sozio de la aŭtoro), kiu pli kaj pli maltrankviliĝas pri maljuniĝo kaj foje melankoliecas. Kaj krom la jam konita emo al seksumado, nun la Doktoro ŝajne ekinteresiĝas ankaŭ pli kaj pli pri drogoj: ĉu por forgesi la melankolion?

En tiuj ambaŭ albumoj, mi rekonis kelkajn jam aperintaĵojn el LKK, sed multajn mi tute ne konis: ĉu temis pri tutnovaj bildstrioj, aŭ ĉu ili aperis en la kataluna revuo Kata-Luno? Ĉiukaze, se vi ŝatas vojaĝojn, Arnaŭ vojaĝigos vin per siaj bildstrioj, ĉar li ĉion rakontas al ni pri siaj (mis)aventuroj tra ĉiuj kontinentoj!

Konklude, en tiuj novaj albumoj, ni retrovas la karakterizajn ecojn de Arnaŭ, t.e. sekso kaj teskto. Sed pri kelkaj aspektoj, la aŭtoro maturiĝis kaj evoluis, sed daŭre tiom ridigas nin. Por siaj novaj albumoj, Arnaŭ per siaj allogaj titoloj mensogis por pli bone reklami, sed li tiom plezurige mensogas. Arnaŭ mensogu plu...

BOVODKO

Nenio pli forta, nenio pli bona...



KIE? DIRU! KIE IDEO POR NOVA KOMIKSO?

ĈU ARANEO TAŬGUS? MI ĈEFROLEMAS, MI POVAS TEKSĪ KOMIKSEĜON...

HMM... ĈU
EBLE
ĈE-PIĈE?

ATENTU, ĈAR MI NE FAKAS PRI
IDEOJ... SED ĴES PRI IDOJ!!

KARA VULVA PUBLIKO:
MI MENSE (KAJ SEKSE) SEKAS!

→ PARDONU VIROJ, TRO LONGE
MI SEN-INAS (*) KAJ DO MI
EMAS NUN MIN TURNI
ĈEFE AL
ISI!!

* FAKTE TEMAS
PRI DU SEMAJNOJ
SEN INO APUDE,
DO, DEKTRI
SEKAJ
TAGOJ
TROE!

LI SEKAS
JE IDEOJ
KAJ TAMEN
METAS
KRAJONON
ENMANE
KAJ EK-
KOMIKSAS
...
MI
JALURAS
AL LA
KRAJONO!

... KIA
MENSOGULO!
MI SCIAS TEMON
PRI KIU LI
CERTE NE
LACIGIS... ĴES,
ĴA... AL SEKSO
LI DAŬRE
SOPIRAS...!
KREDU MIN, MI
ESTAS EN BONA LOKO POR TION SCII!!

ĴEN, ELĈERPIĜAS ĈIUJ MIAJ
ŜATATAJ TEMOJ... MI TAMEN
ANALIZU KIAL!

TEMO-LISTO

- ~~VOJAĜADO~~
- ~~AVENTURO~~
- ~~SEKSO~~
- ~~DROGO~~
- ~~ESPERANTO~~
- ~~FRENEZIĜO~~
- ~~LABORO~~
- ~~POLITIKO~~

LABORO... MI
PRENAS KORON
KAJ FORTON SED
MI DONAS AL
VI MONON!!

POLITIKO...
ĈĈ

PLI
AĈA
INTER-
SANGO
...!


PRI TIUJ DU TEMOJ SUFIĈAS ĈI
APUDAJ BILDOJ... MI TRO ĜUAS
LASI ILIN ĜUSTE TIEL: FOR-
STREKITAJ EL MIA MENSE EKRANO!

NI VIDU DO,
IOM DETALE
LA TEMO-
LISTON

PRI VOJAĜADO

VOJAĜADO?!! HA! KUN TION DA
MILITOJ, RIĈEC-MIZER-KONTRASTO,
FANATIKAĴOJ, EKOLOGIAJ KATAKLISMOJ,
TERURISM-PARANOJO, BUSHA-PUTINA-
(ALDONU VI MEM KELKAJN CENTOJNDA NOMOJ!)
FESISMO, MON-ADORADO TUTPLANEDA... POR
BELE VOJAĜI SENPROBLEME ONI ATENDU REENKARNIĜON KUN FLUGILOJ!

BZZFEKBZZ!! MI CELIS REVIVIĜI
KIEL PARADIZA BIRDEGO... AŬ ALMENAŬ KIEL
BUNTA PAPILIO... ĴA MUŜO HAVAS FLUGILOJN
KAJ LIBERE POVAS VOJAĜI... SED BZZFEKBZZ!
KIAL NEPRE MI TION FARU DE UNU MERDO
AL ALIA?!! POR TIEL VAGADI ĴAM TAŬGIS
LA HOMA
KORPO!



ĴUJE KIEL
PETROJ PEZAJ!
ĈU TROIGITA BILDO PRI KONDOM-STOKO? HA!
POW



PRI AVENTURO, ... LA MONDO ĜIS TIOM STREĈA LOKO, KE SUKCESI TRAVIVI IUN AJN ORDINARAN TAGON ESTAS JA PLEJ GRANDA AVENTURO!!

KIA KURAĜO! ĈU VERE NEPRAS? ... AH! VI ESTAS MIA HEROO!

DUME MI KLOPODOS NE TRO RIGARDI TELEVIDON POR EVITI PLENE IDIOTIĜI!

AH! KAJ KROME HODIAŬ DEVAS VENI LA KOMPUTIL-RIPARISTO! ... KIA AVENTURO, ALFRONTI TION TUTE SOLA!!

ĜIS LA' KARULIN! MI IRAS AĈETUMI PER VETURILO AL IU GRANDA SURFACEJO ... MI ESPERAS REVENI HEJMEN SEN TRO DA VUNDOJ ... KAJ JEN, POR IU AJN KAZO, MI SIGNAS MIAN TESTAMENTON, ONI JA IOM TIMU LA EKSTERAN CIVILIZACIAN ĜANGALON!

VI CERTU, KE SE ONI DONUS AL LA D-RO. ŜTONON POR ĈIU DE LI UZITA KONDOMO... V!



PRI SEKSO, KION PLI EBLAS DIRI, KIU NE ESTU JAM IAM ELSAŬVUMITA... DO, KE MI LACAS PRI KONDOMOJ!

BONEGE! MI ANKAŬ! VENU KARA, NI FARU INFANON!

PREZERVILDOJ POR KRIZAJ FESTOJ...

HMM, TAMEN MI ANKORAŬ ELTENOS IOM DA PLASTAĜO... FAKTE MI HAVAS RESTON DE LATEKS-STOKEGO, KIUN MI AĈETIS POR FESTI MIAN 40-JARIĜON ... KAJ BONE KE TIUJ KONDOMOJ NE KADUKIĜAS ĜIS 2020... MI JA ANKAŬ ŜATOS TRANKVILE PRI-KRIZI LA 50-JARIĜON... SEN BEBAJ PLOROJ APUDE!

MI ŜATUS APARTENI AL "SHREK" ... MI VERDUS VERE ESPERANTISME, KAJ CERTE POVUS NEGLEKTI KONDOMOJN ĈAR JA LA AĜENO DE LA FILMO, ZORGUS PRI LA IDARO...!

HA! ĈU TROIGITA BILDO PRI KONDOM-STOKO? HA!

PONUS PER TIOM DA ŜTONOJ FARI NOVAN KEOBS-PIRAMIDON!

(FAKTE, BELUS POSTE TIE ENTOMBIGI UAN "FARAONAN" KACON KUN EPITAFIO: "KONDOMOJ"



PRI FRENEZIĜO, LA ĈIUTAGA TELEVID-JURNALO MONOPOLIGAS TIUN TEMON; 80% DA NOVAĴOJ ESTAS PURAJ FRENEZAĴOJ (LA ALIA 20%, MENSOGOJ!), MI SOPIRAS AL KOHERAJ AFEROJ!

JEN "POŝTELEFONO POR HUNDOJ... LA MASTRO POVAS VOĈE KONSOLI LA BESTON KIAM LI FORESTAS...

BIIP, BIIP, HUNDĈIĜOO, ESTAS VIA MASTRETOO, MI VENAS POST DEK MINUTOJ... PACIENCETUU... KAJ NE FORGESU KE VI NE RAJNAS MANGI LA TELEFONILON... ĜI ESTAS OSTOFORMA NUR POR PLI ĈARME ASPEKTIGI VIN!

TIU MAŝINAĈO NE JUSTAS, LA MASTRO RAJNAS KONSTANTE ĜENI MIN PER LIA VOĈAĈO KAJ MI HAVAS NENIAN SISTEMON POR POVI EKBOJI AL LI JE LA TRIA MATENE POR FUŝIGI LA DORMON DE TIV IDIOTO!

KAJ MI DO? MI ANKAŬ VOLAS ĈARMI!

DO, KIO RESTAS AL NI? KARAJ VOLUPTAJ PIĈULINJETOJ, PRI KIO MI TAMEN POVUS IOM VERVE KOMIKSUMI? DO, FACILE, PRI LA DU SOLAJ AFEROJ KIUJ HELPAS TRAVIVI IUN AJN MALFACILAN SITUACION:

LA FANTAZIO! KAJ **LA HUMURO!**

HM... MI BALDAŬ IĜOS 40-JARAĜA KAJ MI DAŬRE SOLAS EN LA VIVO!

HE! MI VOLAS VIVI KUN VI, ALMENAŬ ĜIS VI IĜOS 69-JARA, KE NI KUNE OMAĜU TIUN BELAN CIFERON!

JEN MIA KONKLUDO ĈI FOJA, NI RIDU KAJ PRIMOKU ĈION AJN, KROM LA HUMURON! LA HUMURO, JES, LA NURA SERIOZA AFERO, POR KIU MI PRETAS PLU KOMIKSUMI!

ERARE! VI TUTE NE SOLAS! MI TUVI VENAS ĈE VIAJ FINGROJ... KAJ ESTAS UNU VIRINO KIU VENAS AL VI ENTUTE!

JEN SI!

SED, DAMNE, KIU SI ESTAS? KIU SI!

HA, HA, BONE, SED ĈU POR BILDIGI TIUN PENSON, HA, HA, HAA, VI NEPRE DEVAS, HA, HA, TIKLIII MIIIN, AH, HA, HA, HEE NEE!

NE GRAVAS LA TIKLOS, GRAVAS KE VI NUDAS POR KE NI NE FORGESU LA SEKSON!

seke viaj fingroj (kaj sekse!)

* JA, LA SEKSO, HUMURO KUN SEKSO IĜAS EĈ PROFUNDA TEMO... TUTE VOLAPUGA!



LA FRENEZA KOKETO

TEMAS PRI KOKEJO KIE DENT-HAVAS LA KOKINOJ, KOKAS KANGURVO, VEGETARANAS LA VULFO, KTP...





* INTERNACIA SEMINARIO (ĈIUVINTRE EN GERMANIO)






La majstro de la ringoj Vavaa





Fine, Smeagul kaj Frodo decidis
"gej-edziĝi, por plene vivi sian
amon.



Sed...



Nu, Frodo estis
denove sola, sed
li parvis kalkuli je
la amikoj!!

Ĉiuj la
Sarmaj!



Tuj post la
metado de la
ringo, Smeagul
malaperis...





Va²






La dangera lingvo bendi^{oo}





Kapitalisma venko Platano



Lernu pli utilan lingvon: la anglan











Plena Ilustrita Volapüg - 2005


Kruda Vetero

farita de Everland










<http://onapratut.free.fr>

<http://www.bulledair.com/everland>



L.L. ZAMENHOF (1859-1917)

LIA
VIVO



LIA
VERKO



LIA
PUGO



TIU BILDSTRIO ESTAS REKTE INSPIRATE DE LA AŬTOBIOGRAFIO DE L.L. ZAMENHOF, ELDONITA DUM 1907: "MI ZAM, MIA VIVO, MIA VERKO, MIA PUGO".




Ne al la konsumada socio Ali Khadav



ĉie, ĉiam, legu La KancerKlinikon !

Prologo: "unu universo, unu lingvo"

2982. La problemo de komuna lingvo estas jam solvita sur Tero. Sed la pli kaj pli granda facileco vojaĝi space starigas novajn problemojn



Zorhof par-donas

1981...

aperas "la litomiŝla tombejo" de Karolo Piĉ en la seriozaj libroservoj kaj "La aventuroj de Zorhof" de Sergo Sir' en La Kancerkliniko....

bilda deliraĵo far Sire

Tio ne reunigas nin, cxu ne ?

3215. kiel dirite en la prologo, jam solviĝis problemo pri interplaneda lingvo.

El la ekstergalaksia nifo, eliris stranga ekstergalaksiano parolanta strangan ekstergalaksian lingvon

unanime (krom unu sindeteno) la Universala Komitato por Disvastigo de Esperanto decidis lernigi la lingvon al la strangulo

ni do lernigu nian karan lingvon al tiu strangulo !

ĉu oni abonigu lin al LKK ?




Tiam, ankaŭ Mitterand iĝis prezidento... sed pri tio, neniu plu memoras...



Nun starigas la problemo pri intergalaksia lingvo !

oni tuj sendis la propagand-materialon al la strangulo





tiajn reklamojn, ...

Snif snif ! Li tuŝis mian fundamenton mi ne bone komprenis ĉiujn nuancojn




kaj nun, jen mi tute difektita propagandilo !



jen jen jen ! jen laboro por Zorhof !

F.K! F.K! F.K!



Kien do mi metis miajn laborvestojn ?


damno f..ulmo !



malbenitaj tineoj !

nun ni vidos kion ni vidos

pri tiu esprimo, vidu LKKn 25 p 18 pri la benzin-problemo vidu LKKn 7 p.18 k 25



se mi havas sufiĉe da benzino

Mi iras antaŭen kvankam mi havas nek spurojn nek celon

sed mia fidela "fundament", kiun mi rajdas, per si mem akceliĝas... fu! fu! tio ja 'stas spuro !

subite

Aĥ! kio okazas ?? Mi enŝlimiĝas !!



tiu ŝlimo alĝuiĝas, kaj aĉe fetoras... kio do... sed !! sed !!



tiu ŝlimo konsistas el miksado de ĉuro kaj piĉsuko... strange !... kaj tie, en tombejo !



tutsimple sed jes... ja kompreneble !



jes...mi konfesas per tiu lito ŝlima tombejo mi celis konkretigi mian fik-scion

tiu lito-ŝlimo 'stas fakte la rezulto de kaco-lika influo

ja Piĉ devus esti pli hermetika !



la plej saĝa solvo kuŝis ĉe psikiatro (1) kial tiom da vipoj, mmm ?

nu ! mi ege deziris ricevi la vergon de la jaro !...


mi ne eltenas la fumon Bonvolu par-fumi vian pipon, mi petas !



mi ne fumas nur suĉas.. kulpas la Z-a motor-ciklo !



mi estas povra soleca vakero



Venki la seksajn perversojn ne 'stas Zorhof-tasko, tial, por li, falas la kurteno !

(1) stranga situacio: ankaŭ la plej freneza kuŝas tie...

ĉie, ĉiam, legu La KancerKlinikon !



mi ne faros ĉiutage !

AMMISIL® La Lojban sen peno François Hoetzli

«i ko tadni la lojban.
i ju'o do ba nelci leli'i go'i»
(Studu lojbanon, tio certe plaĉos al vi!)

Enkonduko al la lojbana,
far D-ro Frz, Profesoro pri logikaj
lingvoj
Fakultato de artefaritaj lingvoj
Zam-universitato

Ĉio komenciĝis per la hipotezo de Sapir-Whorf: La lingvo, kiun oni parolas ege influas onian percepton de la realeco. Bela hipotezo, sed kiu havas tute stultan sekvon, la politikan korektecon, kiu strebas ŝanĝi nian lingvon por influ ian percepton de la socio... Alia sekvo de tiu hipotezo estas la loglana lingvo. James Cooke Brown kreis tiun lingvon en 1955, komplete disigitan de ĉiu natura lingvo, kaj kies bazo ne estas specifa kulturo sed pura matematika logiko, tiel ke la homoj, kiuj uzus ĝin estu mense pli liberaj kaj povu pensi pli bone kaj pli ĝuste, senbare de la antaŭjuĝoj aŭ de la pensinklinoj de sia propra kulturo. Reguleco, ne-ambigueco, strikte definita gramatiko estas la principoj de tiu lingvo.



Pro disputo kun la Majstro, grupo de loglanistoj (La grupo pri logika lingvo) kreis en 1987 la lingvon Lojban, kies principoj estas similaj sed aldonas novajn celojn al la lingvo: Preter la intenco pruvi la Sapir-Whorfan hipotezon, oni ĉi-foje strebas lingvon kompreneblan kaj de la masino kaj de la homo. La lojbana/loglana fakte vere similas al komputilaj lingvoj kiel Prolog, ĉar ĝi devas servi kiel pontolingvo inter la homa inteligento kaj la artefarita inteligento. Jam Loglan estis menciita pro tiu ebla uzo en sciencfikcia romano de R. Heinlein.

UNUA LEKCIO - PUNKTADO

KAJ LITEROJ

Laŭ strikta gramatika vidpunkto, la Lojbana estas lingvo sen punktado, sen majuskloj. Sed la kutimo firmiĝis, uzi majusklojn por specifaj uzoj (ekzemple por emfazi la akcentitajn silabojn en fremdaj vortoj) kaj uzi punktojn: komenci frazojn per *i* estas tute tradicia, kaj *xu?*, la ekvivalento de nia ĉu, estas ofte ornamita per demandsigno.



Pro la nepunktado, la punkto kaj la komo povas aperi ene de fremdaj nomoj, kiel kvazaŭ ordinara literoj. Ekzistas reguloj kaj konsiloj, kiel literumi pruntaĵojn, ni ne detalos ilin ĉi-tie. Ni simple donu ekzemplon de tri nomoj bezonataj por la sekvaj lekcionoj:

Maria: *mari,as*.

Julia: *.iulias*.

Klaŭdia: *klaudias*.

PER LOJBAN, ONI FINFINE POVAS
BABILI KUN SIA KOMPUTILO!




DUA LEKCIO - VORTOJ

Indas rimarki ke la lojbana skismo devis batali antaŭ tribunalo kontraŭ la aŭtoro de la Loglana, ĵaluzo pri siaj rajtoj. Ĝuste pro tiu ĵaluzo, la mondo

bezonis Lojban, foje nomitan «libera realigado de Loglan». La gramatiko de amba lingvoj ege similas, sed la vortaro de la Lojbana estas komplete novkreita, kaj faras de Lojban tute apartan lingvon, tiel ke se iu parolos la loglanan li ne komprenus la lojbanan sen serioza lernado.

Per komputilaj statistikaj metodoj oni kalkulis kvinliterajn «averaĝajn vortojn» el la pli parolataj lingvoj de nia planedo: La ĉina, la urdua, la angla, la hispana, la araba kaj la rusa. Unu *gismu* nepre havas kvin literojn kaj sekvas la ŝablonon: KVKKV aŭ KKVKV (K: Konsonanto, V: Vokalo kompreneble).

Couturat mortis duan fojon,
kiam de sia tambo li ekŝutis
pri Lojbana lingvo...



Couturat opiniis ke Esperanto estas tro barbara lingvo, en kiu oni ne sufiĉe rekonas latinajn vortojn... Feliĉe por li, Lojban aperis post lia morto kaj li neniam devis trafolumi ties vortaron! Ĝi enhavas 1300 bazajn vortojn (gismu), plejparte rekoneblajn por neniu.

Preter la bazaj vortoj ekzistas la ebleco fari kunmetadojn (*lujvo*) ekz: *kurmikce* (flegisto) el *kurji* (flegi) kaj *mikce* (doktoro).

TRIA LEKCIO VORTOJ EL LA GRAMATIKO

Brivla, cmene, cmavo... estas la tri vorttipoj de la lingvo (partoj de la diskurso, kiel pedantaj grekemuloj diras), *bridi* estas frazo, ktp: La lojbanistoj ne rezistis la plezuron lojbanigi sian gramatikon, tiel ke en lojbankursoj, ĉiu gramatika koncepto havas lojbanan nomon. Tio ĉar estas pli bone kompreni tiujn konceptojn sendepende de la ekvivalentoj en naturaj lingvoj, kiuj havas konotaciojn. Tio ne vere plifa-



ciligas la lernoproceson, sed aldonas kelkajn belajn vortojn al la *gismu*-aro.

Post tiom da teorio, necesas iom da uzebla kono. Jen kelkaj gravaj vortoj: mi : Kiel en nia lingvo, mi!

do : Preskaŭ kiel en la germana du, do, vi.

ti : ŝi, li, ĝi aŭ pli precize tiu-ĉi. Ankaŭ tiu vorto elvokas la esperantan ekivalenton.

Ni ĵus lernis *mi* kaj *do*, du gravajn vortojn ege bezonatajn por konkeri lojbanan koron. Se oni aldone scias ke en lojbanistano, nur pram-estroj rajtas ami, estas nun facile memori kiel oni diras mi amas vin: mi prami do.

Ne miru ke ili ne diras mi pramas do, konjugacio ne ekzistas en la loj-bana. Fakte oni neniam estas devigita precizi kiam okazas kion oni diras. Ni legis komenton de lojbanisto kiu diris: Post longa uzado, aperas sencon pri sentempeco en la menso de lojbanparolantoj.

KVARA LEKCIO - BAZAJ FRAZOJ

Subkategorio inter la bazaj vortoj, estas la *selbri* (Prolog-istoj kaj gramatikistoj diras predikato, programistoj diras funkcio). Ni diros simple « verbo ». Ekzemple: *dunda*, kun la signifo doni.

*la mari,as. dunda la .iulias.
la klaudias.*

Signifas ke Maria donas Julia-on al Klaŭdia (kun artikolo *la* antaŭ la nomoj). Se oni volas ke Maria donu Klaŭdia-on al Julia, oni simple ŝanĝu la vicon de la komplementoj (argumentoj por la programistoj, *sumti* por la lojbanistoj):

*la mari,as. dunda
la klaudias. la .iulias.*

Ĉiu *selbri* (verbo) havas difinitan vicon de komplementoj. Por koni la vicon, oni simple parkerigas la vortaron (ekzistas pli malpli standarda vico tamen!). Ekzemple, la vorto *fanva* signifas traduki. Ĝi havas kvin argumentojn, (kvar sen la subjekto): *fanva*: k1 tradukas k2 en la lingvo k3 el la lingvo k4 kun rezulto k5.

FINA LEKCIO - POEZIO


Kompreneble, oni ne nepre ĉiam precizas ĉiujn komplementojn de la verboj, kaj ekzistas gramatikaj vortoj

por indiki ke oni ŝanĝas la vicon de la komplementoj, por varii la efektojn. Tiel ankaŭ poezio eblas en la Lojbana, kaj ĝi ne estas la lingvo de robotoj kiun kelkaj volas vidi en ĝi.

Kaj nun venas tempon por vi lerni la finan vorton de tiu-ĉi kurso, *fa'o*, kiu gramatike indikas la finon de la diskurso. Ĝi ekzistas nur pro formaj kialoj, kaj estas kutime preterlasitaj, krom de robotoj kaj de pedantoj.

Fa'o

le xisyctu jdaselsku be la jegvon. (ni'o) traduko de la patro nia



doi cevrirni .iu noi zvali le do cevzda dulo
fute .aicai .e'ecai lo do emene ruti censa
.i le do nobli turni be la ter. ku se cfari
.i loi do se djica ba snada mulno vi'e le
cevzda .e .a'o la ter.
.i fu'e .e'o ko dunda ca le cabdei lerinamba mi'a
.i ko fraxu mi loi ri zu'o palci
.i jo mi fraxu roda poi pacyu'e.xrani mi
.i ko lidne mi fa'anai loi pacyxlu
.i ko seprita mi loi palci

Hödos

Eniru la reton dank'al Renato!



www.renato-corsetti.com



Intervjuo de la VVĈP-oj



Ĉu ne estas tro malfacile por vi forĵeti ĉiujn belajn sed tedajn knabinojn?

John : Tute ne : ni ĉiuj gejas! (ridoj)

Antony : So, ne, ne... ĉar mi havas gerlfrejnidon (sed tio estas sekreto, oni ne rajtas diri al la fanatikulinoj)

Chad : Mi neniam vidas knabinojn dum koncerto, mi ne portas miajn okulvitrojn dum the koncerto! (ploroj)

Ĉu vi povus klarigi kio okazis post via koncerto en Biermanio?

Antony : Piuuu longa rakonto!

John : Oh mi ne povas ĉar mi tiumomente min tuŝis... duŝis, min pardonu. Kaj mi ĵus prenis kokainon en Drinkejo ŭauuuuu. (ridoj)

Chad : Yeah, se mi scius, ke en la drinkejo, ankaŭ eblis preni drogojn, mi pli ofte irus tien!! Pri via demando: oni simple malliberigis nin dum horoj. Ni ne vidis, kiuj malliberigis nin, oni maskis kaj ligis nin.

Antony : Jes, kun Chad kaj Flea, ni estis en la vesto-ŝanĝejo sed kiam ni volis eliri, oni malpermesis tion al ni. Fakte, ni ŝanĝiĝis en la diskoteko de la US-ejo [US = *Universala Semajno*].

„ Ili ne ŝatis niajn ŝtrumpetojn !! „

Kial?

Chad : Ĉar ni montris tro dum la koncerto, ili ne ŝatis niajn ŝtrumpetojn (ploroj!)

John : Ili eble ĵaluzis niajn kacojn?

Antony : Oni ne tuj diris al ni. Aspektis kvazaŭ ni estus farintaj iun gravan krimon, sed ni ne sciis kiun. Des pli, ke dum nia unua koncerto en Flaŭnio (ĉe la renkontiĝo NESTO*), ĉio bone okazis fakte. Ĉion-ĉi ni eksciis nur post nia enfermigo, kiam komenciĝis la proceso, ĉar ja stariĝis iu improvizita juĝaro.

Sed kion ili diris al vi dum via malliberejtempo?

Antony : So.. komence oni riproĉis, ke pro nia preskaŭ-nudeco sur scenejo dum oficiala programero, la ministro de Biermanio povus vidi fotojn kaj depreni la subvenciojn, kiujn ricevas la Universala Seminario. Do, tio signifis, ke se ni farintus nian koncerton dum la neoficala programo de la US (kiu estas la plej grava parto de ilia programo kaj enhavas interalie: ebriiĝo, tekilumado, grupfikado, diboĉado, kokainumado, ktp.), tiam tio ne estintus problemo. Sed poste, oni komencis akuzi nin pri ĉio...

Chad : Mi ne memoras ekzakte pri ĉio... nek ke estis infanoj antaŭ la scenejo...

Antony : Pli ekzakte, ke oni vidis kelkajn el niaj haroj, ke ni ne estis sufiĉe belaj laŭ ili por montri sin preskaŭnude, ke estis malpli ol 18-jaraĝuloj ĉe US kaj ke oni povintus ŝoki ilin (krome de la ministro), ktp.

John : Fuck la ministro!! Aĥ aĥ!

Chad : Ili ankaŭ diris, ke ni devas fari tion en nia lando, ke estas kontraŭ la katolika religio.

« Kontraŭ katolika religio »?

Chad : Jes, ili estas religiema...

Antony : Hej, Chad, ne forgesu, ke Biermanio estas protestanta (samkiel ĉe ni, Usono) kaj ne katolika!

John : Mi ankaŭ estis religiema, dum infaneco mi kredis je Avo Frost. Sed poste mi vidis, ke li estas nur drinkemulo kiu pias surstrate...

Ĉu vi atendis tiun reagon?

Chad : Mi esperis malan reagon, plenan je love, je fanatika kraĵo

Antony : Fakte, ne vere... Jes ja, ni sciis, ke tia koncerto povas eventuale ŝoki kelkajn personojn. Sed ni ne antaŭvidis ricevi tian proceson ĉar dum la proceso, kaj vidante la reagojn de la juĝantoj, aspektis kvazaŭ ni estus killintaj dekojn da personoj. Tiom da brutaleco dum tiu proceso, dum ni nur venis por amuziĝi kaj amuzigi la homojn ! Temis nur pri 4 knaboj with ŝtrumpetoj: mi ĵuras, ke ni ne montris niajn kacojn! Ni tamen ne estas Marilyn Manson!



Chad : Kaj neniu vidis min, mi estis la tutan tempon kaŝita de John, kaj Flea la other gitaristo!

Antony : Jes prave! Chad jam sentis, ke ni estis baldaŭ for-maldungonta lin. Fakte, ni ĉiuj maldungiĝis post tiu koncerto! Sed tio estis antaŭvidite: ni planis ĝin, kiel nia adiaŭa koncerto, sed ĝi ne tiom bone okazis, kiom ni esperis...

La Fina vorto?

Chad : Peace to la doktoroj!

(*)NESTO=Naturista Esperantista Semajno Terure Organizita



VERD
VARM
CHILI
DIPROV

LA AVENTUROJ DE



RIKIKI ĈE LA POLICANOJ...





La malbela kuniklo Phiip





www.rabbit-comics.org



www.lapin.org





Recenzoj

La Flambirdo Tezuka Osamu

Kio estas flambirdo ? Flambirdo (alivorte Fenikso) oni nomas tiun birdon kiu povas renaskiĝi el siaj propraj cindroj. 3404 postKriste, la Tero estas kvazaŭ morta, la homaro pluvivas nur loĝante subtere en grandaj urboj. Yamanobe estas dugrada kosmonaŭto kaj loĝas en unu el tiuj kvin gigantaj urboj. Li pasigas bonan tempon kun sia amikino Tamani. Sed ŝi ne estas vere homa, ŝi estas mupio, besto multforma devenanta el alia planedo, nun kontraŭleĝa. Pro amo li rifuzos mortigi sian amikinin kaj forlasos sian urbon kaj profesion. Dum la fuĝado, li atingos la supraĵon de la Tero kaj renkontos strangan ulon klopodantan repopoligi la planedon, kaj la Flambirdon. Li tiel travivos eksterordinaran aventuron, kaj fariĝos vole-nevole atestanto de la destino de la Tero.


Laŭdire, TEZUKA Osamu estas la kreinto de la mangaoj. Kompreneble, li ne estas la unua

verkisto de tiajn japanajn bildstriojn sed li ja estas grava influinto de tiu ĉi stilo. Li naskiĝis en 1928 en Toyonaka kaj forpasis en 1989. Li frue komencis verki mangaojn kiam li estis ankoraŭ studento. Interalie, lia verkaĵaro enhavas la faman serion la forta knabo Atom, ankaŭ konatan kiel Astroboy en la angla lingvo. Li ankaŭ ege influis la nemalnovan filmon Metropolis far Rintaro.


Tiu ĉi libro estas fakte parto de la samnoma verko « *La flambirdo* ». Ĝi estas naŭparta verko kiu konsistas duone el rakontoj el historio de Japanio kaj duone el sciencfikciaj rakontoj pri futuro. La traduko estas sufiĉe bona, fare de japano kaj la desegnoj rondemaj bone memorigas pri la stilo de la konata Astroboy. La rakonto estas interesa sciencfikciaĵo pritraktanta estontecon de la Tero kaj de la homaro, kaj simplan homon kiu alfrontas sian destinton kiel sola atestanto de la posthomar-aĝo.

Fine de la libro troveblas teksto pri la vivo de TEZUKA Osamu. Nur bedaŭrinde, ke la aliaj partoj de « *La flambirdo* » ne estas tradukitaj.

Rubulo



Persipolis Marjane Sarpat



Klare Marjane Sarpat ne ŝatas la nunan iran registaron. Eble ŝi kovris sian hararon, kaj restis diskreta kiel ĉiuj 'decaj' virinoj. Tamen ŝi profunde amas sian landon.

Persipolis ĉefe traktas pri historio de Iranio tra la okuloj de Marjane. Pri la revolucio kaj ties transformo al islama revolucio. Baldaŭ eksplodas milito kontraŭ Irakio. La etoso estas pli kaj pli malfacila. Pro la timo de siaj gepatroj, la adoleskino kiu ankoraŭ estas Marjane foriros en Aŭstrion.

Perdita eksterlande ŝi revenas kiel plenkreskulino denove perdita. Iranio ne plu rekoneblas, 'ĉiuj stratoj ŝanĝiĝis al nomoj de martiroj'.

En la 5 volumoj nuntempe eldonitaj, kortuŝaj kaj simple sed efike

desegnitaj, M. Sarpat ege transdonis sian senton. Vi rapide ilin legos. Eble pro ke M.S studis en diversaj francaj liceoj, ili estis unue eldonitaj en la franca; Usona eldonisto tradukis ilin al la angla, espereble baldaŭ venos aliaj lingvoj.

Platano





Alvoko al internacia subteno por eldono de nova albumo de Tinĉjo

Maus Art Spiegelman



Maus por Mauswich... Tutklare la libro pritraktas la plej teruran parton de la eŭropa historio. Musoj estas Judoj, katoj estas Germanoj. Per simplaj reguloj Spiegelman povas ludi; ekzemple muso, kiu havas maskon de kato estas kaŝita judo. Spiegelman ricevis grandegan sukceson dank'al Maus.

Tiu libro montris, ke bildstrio povas ankaŭ helpi komprenon de grava temo. Eĉ havis problemon la libro-vendejoj por ordigi tiun-ĉi libron: « ĉu ĝi estas komikso » ?

La esperanta literaturo ebligas nur unu persono alportas diskonigi la internacian bezonatan monon, malfacilas lingvon Esperanto. Konataj garantii plenan financadon. libroj faciligas tion, tiel la pasintaj albumoj de Tinĉjo, « la nigra insulo » kaj « la krabo kun oraj pinciloj » alportis fortan famon al nia lingvo dank'al la famo de Tinĉjo inter franclingvanoj kaj ankaŭ en la tuta mondo dank'al tradukoj en pli ol 60 lingvojn.

La asocio JEFO alvokas ĉiujn, kaj homojn, kaj asociojn, ne por doni, sed por pruntedoni la necesan monon. Poste, estas du eblecoj, ĉu vi mem deziras vendi la albumojn okaze de budoj kaj ĉe viaj membroj, ĉu vi lasas JEFO vendi ilin kaj ni redonos al vi, kaj la pruntitan monon, kaj la profitojn de la vendo.


Ĉeesto de albumoj ce budoj alproksimigis junulojn kaj plenkreskulojn. Hodiaŭ, tiuj albumoj estas elĉerpitaj kaj estas taŭga momento por eldoni novan albumon.

Tiaj eldonoj multekostas kaj bezonas longan tempon antaŭ ol la monpruntadonintoj rehavu sian monon. Kiam

La asocio JEFO alvokas ĉiujn, kaj homojn, kaj asociojn, ne por doni, sed por pruntedoni la necesan monon. Poste, estas du eblecoj, ĉu vi mem deziras vendi la albumojn okaze de budoj kaj ĉe viaj membroj, ĉu vi lasas JEFO vendi ilin kaj ni redonos al vi, kaj la pruntitan monon, kaj la profitojn de la vendo.

Axel

Platano





Renkonto kun Fernando Gonsales Luiz

Jen bildstrioj de la brazilano Fernando Gonsales. Lia ĉefa rolulo estas la rateto Níquel Náusea, Esperante Nikelo Naŭzo, nomo, kiu estas serĉo pri alia fama rateto, Mickey Mouse. Krom Nikelo estas aliaj bestaj roluloj, kiel la ratego Ruter, la blato Fliti kaj aliaj. Homoj ankaŭ estas en liaj bildstrioj, tamen ĉiam rilatante kun la besta mondo.


Fernando diplomiĝis pri biologio kaj bestkuracado kaj laboris provante savi bestojn ĉe konstruata

hidroelektra uzino. Li tute turniĝis al laboro pri bildstrio, kiam en 1986 li gajnis konkurson pri bildstrio de la ĵurnalo Folha de São Paulo, unu el la plej gravaj brazilaj ĵurnaloj, en kiu ĝis nun liaj bildstrioj legeblas. Hodiaŭ liaj bildstrioj legeblas en ĉirkaŭ dek aliaj grandaj ĵurnaloj de Brazilo kaj ankaŭ en unu de Portugalio.

Liaj bildstrioj jam ricevis plurajn premiojn kaj pri desegno kaj pri historio. Jam eldoniĝis pluraj libroj nur kun liaj bildstrioj.

Esperanta ret-paĝo pri Nikelo:
<http://www.lujz.org/niquel>

En la Portugala estas ret-paĝoj:
Oficiala Ret-paĝo de Níquel Náusea
<http://www.terra.com.br/niquel/>
Eldonejo Devir
<http://www.devir.com.br/hqs/gonsales.php>





Kabe kurso *Hodos kaj Tifen*



Vavaa vivo

